


# TEA-BULTENO

**14ª JARO** **JANUARO - FEBRUARO 2011** **NUMEROJ 1-2**

Neniam homo estas tiel sincera ol kiam li mem asertas esti malsincera.
*Mark Twain (Usona verkisto - 1835-1910)*

## Kara Legantaro!

Bonan Novan Jaron! Ankaŭ en 2011 TEA-Bulteno, pli-malpli akurate, eniros viajn hejmojn, kunportante - mi esperas - interesajn novaĵojn, legindajn rakontojn, priesperantajn informojn, spertindajn receptojn, allogajn programerojn. Se tiel ne estos, fine de la jaro mi rajtigas vin maldungi min! Rigardante la frontpaĝon, tuj sub la ĉarma ĵurnalvendisto, kiu iam reklamis la mondkonatan "La Eta Gazeto"-n, eble ankaŭ vi rimarkis, antaŭ kiom da jaroj, duboplena, timeme, kun egaj strecxo kaj strebo, mi kuraĝis, kvankam en tre modesta formo se ni komparas ĝin kun la tiama gazeto, daŭrigi la "redaktadon" de ĉi asocia kunligilo. "14ª Jaro": estas tie skribite. 14 jaroj: vere nekredeblas! 14 jaroj, dum kiuj, unuaperiode ĉiumonate, poste ĉiun duan monaton, seninterrompe TEA-Bulteno atingis vin. Dum la tempopaso eĉ kreskis la folioj (sed nun ni esperu, ke la arbo donos iom pli da fruktoj, ĉu ne?), ĉar de du-paĝa, ĝi iĝis kvar– kaj poste eĉ ses-paĝa. Kiu la kaŭzo? Ĉu eble la redaktanto iĝis pli skribema aŭ ĉu aprobaj leteroj de legemuloj stimulis la verkemon? Nek unu nek la alia! Temis pri normala evoluo de publikigaĵo, ŝuldata ankaŭ al aktuala pli facila ellaborado kaj kompostado danke al teknika moderna ilaro, al simpleco konsulti ttt-ejojn, retajn informejojn k.s., el kiuj elŝuti novaĵojn aŭ ankaŭ malnovajn, forgesitajn historiaĵojn, kunlige kun la deziro doni al asocianoj ion interesan por legi, kio, interalie, favoras la praktikadon de nia kara lingvo.
Do, alia jaro forpasis, ni pli kaj pli maljuniĝas, sed nia emo penadi antaŭenigi nian aferon, restas ankoraŭ freŝe juna. Ni klopodas kaj klopodas, "*ni semas kaj semas, neniam laciĝas pri l' tempoj estontaj pensante*", ĉar valoras la penon disvastigado de la grandaj valoroj de Esperanto.
Tial, en novembro, oni komencis labori por aranĝi la ekspozicion pri desegnaĵoj kaj poeziaĵoj, faritaj de geknaboj ekde 6 ĝis 14 jaroj, kun temo: "Kristnaska Poezio", en la Komerca Centro "*Il Giulia*". Aro da helpemuloj laboris por la muntado dum multaj horoj kaj fine kontentiga kaj alloga estis la rezulto de tiu komuna laborado. La ekspozicio viziteblis de la 6ª ĝis la 20ª de decembro kaj, dum tiuj tagoj, pluraj vizitantoj voĉdonis pri la preferata verko. Kelkaj klubanoj deĵoris alterne kelkajn horojn en la posttagmezoj, kvankam verdire estus bezonate esti tie tutan tagon, sed kompreneble tio ne eblis. Inaŭguris la ekspozicion la kultura komununa skabeno M. Greco, ĉeestis kelkaj prezidantoj de aliaj triestaj kulturasocioj, kun kiuj ni kunlaboras, kaj kelkaj triestaj esperantistoj. La inaŭguro, aŭ pli bone la ekspozicio, estis filmita de Karintia Aŭstra Televido, kiu videblos ĝis la 8ª de januaro ĉe http://kaernten.orf.at/magazin/magazin/servussrecnociao/.
En la ekspoziciejo, dum sabata posttagmezo, kun vere amikeca spirito, prezentis kelkajn kantojn kristnaskajn en esperanta, itala kaj slovena lingvoj la virinvoĉa ĥoro "Ivan Grbec" el Servola, direktata de Marjetka Popovski: ege bedaŭrinde nur du TEA-anoj estis tie por ĝin aŭskulti kaj aplaŭdi. Varman dankon al la estrino kaj bravaj kantistinoj pro ilia valora kontribuo. Verdire pluraj niaj asocianoj ne vizitis la ekspozicion: ĉu eblas, ke oni ne trovis tempon ene de du semajnoj por tion fari? Se eĉ niaj homoj ne sentas emon subteni - almenaŭ per simpla ĉeesto - nian agadon, do... kion ni atendu de la aliaj?
Nun kelkaj ciferoj pri la 4ª Internacia Konkurso Kristnaska: alvenis entute **542** desegnaĵoj el **12** landoj: Belgio, Bosnio k. Hercegovino, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Italio, Kroatio, Litovio, Rumanio, Ruando, Vjetnamio. El Bulgario ni ricevis la plimulton de la verkoj: imagu, 357!!! Miaopinie tiun riĉan rikolton ni ŝuldas al la valora engaĝiĝo de TEA-Amikino, s-ino Galja Nikolova, kiu sukcesis tiom efike propagandi nian konkurson tra la tuta Bulgario. Pluraj desegnaĵoj estis faritaj de lernantoj de Art-lernejoj: konsiderinde altnivelaj ellaboraĵoj! El Kroatio, danke al zorgado de Marija Beloŝeviĉ, ni ricevis 110 verkojn. Mardon la 14ªn de decembro estis organizita koncerto ĉe salono Beethoven: temis pri la ĥoro "Lions Singers" sub gvidado de la fama M° Severino Zannerini, kun kiu ni konatiĝis okaze de lia aprila/maja ekspozicio, pri "Pinokjo", la fama marioneto, kies pasia kaj fervora kolektanto li estas. Tiam estis al li donacita la esperantlingva versio de la libro, verko de la itala Collodi, kaj, por reciproki, li mem proponis ian muzikprogramon, kiu, fine, estis realigita ĝuste en decembro. Malgraŭ abunda disdonado de invitiloj, telefonalvokoj aŭ retmesaĝoj al membroj, amikoj, amikoj de l' amikoj, publiko malabundis: ĉu pro la diversaj samtempaj okazaĵoj en la urbo? Ĉu pro malatentemo aŭ malzorgado? Ĉu...? Bedaŭrinde, ne nur ĉar mizeran impreson ni donis, sed tiom pli bedaŭrinde ĉar la spektaklo vere indis; trian bedaŭron oni devus havi, ĉar la sekva bufedo estis pli ol kontentiga kaj abunda - do, vi kiu ne ĉeestis multon perdis ... kaj pli kaj pli mi konsciiĝas, ke veras tio, kion ofte ripetadis al mi mia tre kara amiko Aldo: "Memoru, karulino, ke ... 'kio perdita, tio foras por ĉiam'".
Nu, ne plu bedaŭroj, ne plu priplorindaĵoj, ni nur pensu al estonto, ni kunigu niajn fortojn por daŭre puŝi antaŭen nian idealon, kiu, se ni estas konvinkitaj pri ĝia valoro, povas riĉigi nin pli ol iu ajn riĉaĵo el tiu ĉi mondo, ĉar materia riĉeco plenigas nur la poŝon, dum malmaterio plenigas nian spiriton.
Kun denovaj plej sinceraj deziroj de Sana, Sukcesa kaj Senproblema 2011ª Jaro, vin salutas

Via redaktanto




Iun tagon pasintjaran, mi ricevis donace libreton, kies titolo tuj vekis mian scivolemon:

**Embarasismoj** «Ĉiutagaj embarasoj blanke kaj nigre»

Stranga titolo, ĉu ne? Do, ĝin mi malfermis, iomete trafoliumis, nu, ... nur mallongaj rakontoj, vivospertoj: mi eklegis unu je la komenco kaj tuj poste alian fine de la libreto, kaj poste alian meze de ĝi, kaj fine mi decidiĝis kaj, fulmorapide, ellegis la tuton. Kaj kia embaraso, je la fino! Jes, embaraso, ĉar en tiuj anekdotoj facile rekoneblis eĉ la konduto de mi, kiu, pro sia esperantisteco, ĉiutage plenigas sian buŝon per vortoj, kiaj egaleco, samrajteco, solidareco, ktp ktp, sed kiu fojfoje, same kiel multaj aliaj, stumblas/is sur la malfacila tereno de problemaro pri enmigrantoj, pri fremduloj enirantaj proprajn urbon kaj landon... Ĉi libreto prezentas la bildon de "ni" viditaj de "la aliaj" kaj priskribas, per vidpunktoj ne apartenantaj al "ni", diversajn ĉiutagajn vivocirkonstancojn.

Por pli rekta kompreno de la enhavo, en du sinsekvaj numeroj de TEA-Bulteno, aperos entute tri anekdotoj, elektitaj el tiu libro, kies aŭtoro tre ĝentile rajtigis min kaj traduki kaj publikigi.

Sed unue ni iomete konatiĝu kun la verkisto Kossi Amékowoyoa KOMLA-EBRI

Naskita en Togo (Tsévié) la 10an de januaro 1954, post akiro de abitiurenta diplomo en Francio, li ekloĝis en Italio (1974), kie li gastis ĉe Kardinalo *Giacomo Lercaro*, en la Internacia Internulejo "Vilao Sankta Jakobo". Magistriĝinte pri Medicino kaj Kirurgio en Bolonjo, li specialiĝis en Milano pri Ĝenerala Kirurgio. Hodiaŭ Kossi laboras ĉe Analiza Laboratorio en la Malsanulejo *Fatebenefratelli* de Erba (Komo). Edziĝinta, li havas du filojn kaj loĝas en *Pontelambro*, provinco de Komo.

En 1997 li ricevis la unuan premion pri rakonta ĝenro, per "Kiam mi transiros la riveron", kaj sekvajare li estis premiita pro la novelo "*Malsano je…"*. Pluraj liaj eseoj kaj rakontoj estis publikigitaj de diversaj revuoj (*Lettere*, *Caffé*, *NarraSud* k.a.). Li skribis krome eseon dediĉitan al Itala Literaturo de Migrado, publikigita en germana revuo (2000): "Ankaŭ mi estas Italio".

Kune kun la itineranta kuracisto *Aldo Lo Curto* kaj la brazila desegnisto *Ubiratan Porto*, li estas kunaŭtoro de "Afriko. Sano en bildoj", manlibro, ankaŭ en anglalingva versio, kiu estas disdonita senpage en diversaj afrikaj vilaĝoj cele la disvastigadon de sanitara edukado inter la lokaj popoloj.

Prezidinto-fondinto de Asocio Solidareco Afrika *Erba*, diskoniganta la afrikajn valorojn role de kultura peranto, li estas ankaŭ honormembro, ekde 1995, de la asocio "*les culture-onlus*", laboratorio pri internacia kulturo, kies celo estas favori pensmanieron kosmopolitan kaj disvastigi la ekkonon de popoloj, ties historio kaj kulturo. Kiu deziras plue informiĝi, povas viziti lian ttt-ejon: www.kossi-komlaebri.net

Kaj jen la unuaj du rakontetoj:

*E.D.*

### *"Pardonu, ĉu vi estas italo?"*

Fininte siajn studojn ĉe flegista lernejo, Akolè ekdeĵoris ĉe kliniko. Delikata etulino, kun tre ĉarmaj manieroj, ŝi estis tre aprecata ĉe sia fako pro siaj kapableco, ĝentileco kaj proverba sindediĉemo.

Tamen, iuvespere, estis iu paciento, kiu, insiste kaj persiste, klopodis elprovi ŝian nervan eltenemon. Ne tiom ĝenis ŝin, ke la malsanulo, kuŝanta en la lito 124, ade kaj ree sonorigis, nek ke tiu pozis kiel ĉiopovanto, pro la nura fakto ke lia buŝo plenplenis je mono.

Kio plej iritis Akolè-n, estis ke je la unua alvoko, apenaŭ ŝi ekeniris la ĉambreton, tiu, post atenta esplorado de ŝia *sunbrunigita* vizaĝeto, ekmontris fingre la fenestron, dirante:

- Mi varmo, ci malfermi!

Konsternite, Akolè iris malfermi la fenestron.

Je la dua alvoko, la ulo elkraĉis:

- Ci, alporti min papagon por *pss*! Komprenite?

Elfarinte sian fiziologian bezonaĵon, la aĉulo ree vokis ŝin:

- Mi farita, ci forporti papago!

Post la kvara sonorado, la barbaro diris:

- Nun havi malvarmon, ci fermi fenestron! Komprenite? FERMI FENESTRON!

Je tiu punkto, lime de sia memregado, nia heroino lin mezuris de alto ĝis subo kaj lin demandis per mieleca kaj milde mallaŭta voĉtono, en senriproĉa itala lingvo:

- Pardonu min, sinjoro, sed ĉu vi estas italo? Mi hontus terure, se iu tiele parolus mian lingvon!

Kaj, turniĝinte, ŝi eliris.

Duonkoridore nia flegistino memoris, ke ŝi ne fermis la fenestron, sed – strange! – la dupiedulo ne plu vokis ŝin (almenaŭ tiun vesperon).

Eble li estis kompreninta.

### *Kulturoj … aliaj*

Tio ĉi okazis ĝuste al mi, dum la universitataj tempoj. Estis iu mia amiko, Mikaelo, kiu, siadire, avidis konatiĝi kun aliaj kulturoj kaj eklerni novaĵojn. Tial, iusomere, mi invitis lin miahejmen en Togo.

Komence li montriĝis entuziasma pri ĉio, sed post du tagoj li fermiĝis en plej totala muteco. Je mia re-kaj-rea insistado ekkoni la kaŭzojn de tia peza silentemo, minacanta forŝovi nian amikecon, li nervoze eksplodis:

- Nu, kial vi tiamaniere paŝas kaj ĉion faras per tia malrapidemo? Kial vi perdas tiom da tempo? Kial vi manĝas kune el la sama telero? Tio ĉi estas malhigiena! Kial viaj kortoj estas ĉiam tiom homoplenaj? Tiele ne plu ekzistas privateco! Kial vi ne faras kaj kondutas kiel ni, ni… ni…

Mi klopodis klarigi al li, ke *nia* malsama manĝmaniero, nia malsama paŝado, nia malsama vestmaniero estas ĝuste la elementoj de *nia* kulturo kaj ke, se li rifuzas ĉion ĉi, li iel rifuzas ankaŭ mian kulturon.

Tiam li ne sukcesis min kompreni. Nur je sia foriro, min brakumante en la flughaveno, Mikaelo deklaris:

- Ci devas scii, Kossi, ke mi lernis unu egan gravaĵon: mi estas eŭropano.

"Jes, mia kara Mikaelo" mi estus dezirinta diri al li "ci estas eraranta denove: ci estas germano!"

---

*Elkoran dankon mi adresas al la aŭtoro, Kossi Amékowoyoa KOMLA-EBRI, kaj al eldonejo **Edizioni Dell'Arco**, permesintaj publikigon de la anekdotoj.*

# DEVIGATAJ PENSOJ

"Ĉu via lingvo kapablas influi vian pensmanieron?". Jen la titolo de gravega kaj tre interesa artikolo [(1)], resumo de la plej lastaj esploroj pri rilatoj inter la gepatra lingvo kaj la individua pensokapablo.
Starte de la unuaj studoj en 1940 far la usona Benjamin Lee Whorf, kiu asertis, ke: "nia patrolingvo **limigas** tion, kion ni kapablas pensi", lastatempaj esploroj signife progresis, malkovrigante, ke tiaj menso-kutimoj, kiujn ni akiras lernante patrolingvon, **kondiĉas** niajn spertojn – do, ne limigas la menskapablon – signife kaj ofte surprize!

Lingvo mankanta de onto-tenso ne senigas nin je la koncepto de estonto, kiun eblos esprimi per anto-tenso: ĉu vi **venas** morgaŭ? Fakte en la ĉina lingvo por intaj, antaj kaj ontaj agoj uzatas ununura verbo-formo. Lingvo, do, pro neceso precizigi kelkajn informojn, devigas nin atenti apartajn sperto-aspektojn, je kiuj parolantoj de aliaj lingvoj ne devas daŭre pensi.

Krome interesa estas la "vorto-genro", kapabla kondiĉi niajn sentojn pri la cirkaŭaj objektoj kaj la koncernaj ideokunligoj. Per psikologiaj eksperimentoj, pruviĝis, ke kun la vorto "ponto", germanoj kunligas inajn karakterojn – *die Brücke*, inagenre en la germana – dum hispanoj masklajn karakterojn – *el puente*, virgenra en la hispana. En alia eksperimento, kun la bildo de "forko", francoj kunigis inan voĉon – *la fourchette*, ingenra en la franca – dum la hispanoj masklan – *el tenedor*, virgenre en la hispana. Kompreneble, ĉiuj homoj – francoj, germanoj, hispanoj – certe konscias, ke tiuj objektoj estas tute seksomankaj, sed la strukturo de iliaj lingvoj certe modifis la esprimmanierojn.

Surprizaj pruvoj de lingvo-influo sur la penso troviĝas ĉe spaco-priskribo: okcidentaj lingvoj uzas **egocentrajn** koordinatojn – dekstre, maldekstre, antaŭ, malantaŭ – sed en aliaj mondo-partoj, kiel Polinezio, Meksiko, Namibio, Aŭstralio, ekzistas lingvoj utiligantaj **geografiajn** koordinatojn: nordo, sudo, oriento, okcidento. Povas okazi, ke aŭstralia praloĝanto atentigas vin pri "tiu granda formiko ĝuste je nordo de via piedo" kiu efektive situas … malantaŭ via piedo! Tiuj gentoj ŝajnas profiti je kunnaskita senso de orientiĝo, posedi en sia cerbo specon de kompaso, ĉiam funkcianta, sendepende de la loko en kiu ili troviĝas: en densa arbaro aŭ vasta ebenaĵo, ekstere aŭ enĉambre, senmove aŭ promenante; ili eĉ okazintaĵojn kune kun tiuj geografiaj rilatpunktoj memoras.

Do, ĉiu lingvo kondutas kiel speco de **lenso** kaj, depende de propra strukturo, alimaniere vidigas al ni la mondon, kondiĉante niajn pens- kaj esprimmanierojn. Aparta lingvo estas esprimo de aparta gento, kiu estigis sian esprimkodon laŭ kondiĉoj kaj necesoj de la loko, kie tiu gento loĝis kaj evoluis. Tion precipe spertas la enmigrintoj, kiuj, per lernado de nova lingvo, ja i**ntegriĝas** kun la loka gento. Ilia idaro tute asimiliĝas, escepte de la fizika aspekto: ŝanĝiĝas ilia tuta pensmaniero kaj perdiĝas identeco. Kun la paso de la tempo eĉ sian gepatran lingvon ili forgesas.

Lernado de fremda lingvo, onidire, nin riĉigas pro plivastiĝo de niaj horizontoj, de nia mondo-vido. Konsentite! Sed laŭ tiuj ĉi lastaj studoj esplorinda estos ebla influo sur niajn pensmanieron kaj mondopercepton.

Tion ekde ĉiam Esperanto asertas, kaj nun eĉ psikologaj eksperimentoj pruvas.

Prave! **VIGLO**

**(1)** *"Does your language shape how you think?" far Guy Deutscher, profesoro ĉe Universitato de Manchester (Britujo) en la usona revuo* ***"The New York Times Magazine"*** *(La magazino de Nov-Jorkaj tempoj), aŭgusto, 2010.*

## *ESPERANTO-LIBROJ AL NAŬ BIBLIOTEKOJ (inter kiuj ankaŭ TEA!)*

Ĉiuj naŭ Esperanto-bibliotekoj, kiuj petis subvencion de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen de UEA, povos baldaŭ pliriĉigi siajn kolektojn de Esperanto-libroj. La estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj ĝenerala direktoro Osmo Buller asignis subvenciojn el tiu fondaĵo je la suma valoro de 1200 eŭroj.

La plej grandajn subvenciojn, po 200 eŭroj, ricevis Biblioteko Interlingvistika Fenikso el Venezuelo kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Kroatio. Po 120 eŭroj estis asignitaj al Pernambuka Esperanto-Asocio el Brazilo, Kleruma Esperanta Klubo el Kubo, Biblioteko por Skoltisma Interkultura Pedagogio el Rumanio, Unuiĝo de Verdaj Amikoj el Togolando kaj Biblioteko Culbert el Usono. La bibliotekoj de Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj kaj **Triesta Esperanto-Asocio** el Italio ricevos ambaŭ librojn por 100 eŭroj.

Biblioteka Apogo Thorsen donas subvenciojn ĉiujare ekde 1997. La originala kapitalo, donacita de ges-roj Thorsen, sufiĉas ankoraŭ por unu disdono. Petoj por tiu lasta disdono devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15ª de oktobro 2011. Kun la peto oni sendu liston de deziratataj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

Koregan dankon pro la libra subteno de Triesta Esperanto-Asocio al asignantoj kaj Biblioteka Apogo Thorsen!

### *Nun en la reta brokantejo de UEA ankaŭ periodaĵoj*

Multaj valoraj Esperanto-libroj estas malfacile haveblaj, ĉar ili elĉerpiĝis. La fako de brokantaĵoj en la Libroservo de UEA jam de longe proponas solvon por tiuj, kiuj serĉas elĉerpitajn titolojn. Jam de kelka tempo la brokantaĵoj estas integritaj kun la reta katalogo de la Libroservo, kiu lastatempe enretigis ankaŭ liston de malnovaj periodaĵoj.

La reta brokantejo troviĝas ĉe: katalogo.uea.org/index.php, kie eblas serĉi deziratan libron per tajpado de ĝia titolo en la serĉfenestreto. Eblas ankaŭ foliumi listojn de brokantaĵoj ordigitaj alfabete laŭ la titolo.

Klakante la mendobutonon ĉe la koncerna titolo oni povas meti ĝin en sian aĉetkorbon, tute same kiel ĉe la "malbrokantaj" eldonaĵoj. Eblas ankaŭ elŝuti alfabete ordigitan HTML-liston de brokantaĵoj. Meze de septembro estis listigitaj preskaŭ 1400 titoloj. En la nova brokantejo de periodaĵoj, tiuj estas ordigitaj alfabete laŭ la titolo. UEA konstante aktualigas la katalogon kaj de tempo al tempo ricevas novajn brokantajn revuojn, same kiel ankaŭ librojn.

Do, legemuloj, ek al mend' kaj leg'!

## Trafoliumante libron de historiaj rememoroj pri Trieste

### Monumento al Giuseppe Verdi

Skulptita de la milana *Alessandro Laforet*, ĝi estis inaŭgurita kelkajn monatojn post la morto de *Verdi* mem: ĝi estis la unua monumento en la tuta itala duoninsulo starigita honore al li! El tiuepokaj fotoj videblas, ke ĝi estis el blanka marmoro: fakte la unue farita skulptaĵo estis el blanka karsta ŝtono. Maje de 1915, post kiam la Itala Regno ekmilitis, la monumento estis dispecigita de aŭstriemaj violentuloj: post la milito oni ĝin refaris per la "bronzo de la kanonoj de la venkita malamiko". La skulptisto imagis ĝian situon aliloke, nome en la placo antaŭ la komununa Teatro, kiu mem alprenis la nomon de la fama itala muzikisto.



Unuaprojekte, li estus preferinta prezenti la grandan *Verdi* en stara pozicio, dum li estas direktanta sian orkestron. Sed ne eblis, ĉar estis decidite, ke tiu statuo ne superu la altecon de la teatra arkaĵo. Tial oni starigis la monumenton en Placo *San Giovanni* (Sankta Johano), kiu reprezentas *Verdi*-n sidantan sur brakseĝo. Verdire la nuna bildo montras viron iom lacan, kio tute ne akordiĝas kun la reala, tre vigla, temperamento de la artisto kiu aktivis ĝis sia lasta vivotago kaj mortis grandaĝe.

Tre interesan foton/bildkarton mi trovis antaŭ jaroj: adresita al esperantisto Georges Bruloot el Bruselo, ĝi estis skribita de Francesco Chierego, tre vigla aktivulo de tiama Triesta E-Asocio, fervora propagandisto kaj kunlaboranto de Arturo Ghez, la unua prezidanto de Rondo Esperanta Triesta, de li fondita en 1906. Jen liaj vortoj: "[...] Hodiaŭ mi sendas al vi fotografaĵon montrantan la aliron de la multnombraj artaj, kulturaj kaj sportaj societoj al la monumento starigita je memoro de l' glora muzikisto Giuseppe Verdi, la dimanĉon 12an nunan (*1913 - ndr*), okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de la suprenomita majstro. Nia Rondo Esperanta ankaŭ partoprenis la feston kaj svingigis ĝian belegan silkan flagon. [...] Via Franc. Chierego."




Ni fiere levas la kapon, por diri: "Ankaŭ ni ĉeestis!" dum tiu grava evento.

## Iom da kalkuloj

**Pli ol 50 fojojn!**
La poluado kaŭzita de *Ford*-aŭtomobilo el jaro 1976, kompare kun la samspeca, aktuala modelo!

**Medio en Italujo**
*La saketoj iĝas biomalkombineblaj.*
Ekde januaro 2011 la aĉetsaketoj ne plu estos el polietileno, sed el biokombiniĝa plasto.
Cetacoj sufokiĝintaj. La ĝis nun uzataj saketoj dissolviĝas post jarcentoj, la uzotaj en tri monatoj. Tamen ili kostos 10 anstataŭ 5 centimoj. Sed se ni rigardas la aktualan pejzaĝon, aspektanta kiel paradejo de saketoj, kaj pripensas pri la bestoj mortintaj pro englutado de tiuj plastaĵoj, tutcerte ĉiu el ni konsentos, ke nepras forĵeti tiujn danĝerajn, kontraŭmediajn saketojn.

**Ne plu Aidoso ĉe ĵusnaskitoj**
Sano. Ĉiun jaron en landoj je malalta kaj mezalta enspezaro, 1000 beboj infektiĝas je Aidos-viruso dum gravedeca, akuŝa kaj mamnutrada periodoj.
Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Urĝa Helpo al Infanoj (UNICEF). Jimmy Kolker, *Unicef*-responsulo pri *HIV*-infektiĝo, strebas haltigi tiun ĉi homaran tragedion ene de venontaj 5 jaroj. Kiel? Disdonigante al infektitaj patrinoj aŭ al mamsuĉantoj kontraŭretrovirusan terapion.

**Kiom pezas piramidoj?**
La granda piramido Keopso, en Giza (Egiptujo) konsistas el ĉirkaŭ 2,3 milionoj da ŝtonblokoj. Ĉiu el tiuj pezas inter 1,3 kaj preskaŭ 10 tunoj; averaĝe, laŭ spertuloj, po 2,5 tunoj. Sekve, se matematiko ne estas nura opinio, la tuta piramido pezas ĉirkaŭ 6 milionojn da tunoj.

**Kiom grandas Amazonio?**
La baseno de Rivero de Amazonoj kovras areon de ĉirkaŭ 7 milionoj da kvadrataj kilometroj, kies 5,5 procentaĵo estas kovrita per pluv-arbaro. Tio egalas al ĉirkaŭ la duono de Eŭropa surfaco. La tuta brazila teritorio konsistas, 66-procente, el Amazonio.

**Kiom da kalorioj enhavas laktokremo?**
100 gramoj da ŝaŭma laktokremo enhavas inter 250 kaj 350 kalorioj kaj 94 procentojn da grasoj, malgraŭ ke la kremo konsistas el ĉirkaŭ 60% da akvo. La kremo uzata por kuiri estas malpli kaloririĉa: inter 200 kaj 250 kalorioj, po 10 gramoj. Tiuj kremoj enestantaj en ŝprucigiloj havas proksimume 280 kaloriojn. Atentu, atentu, precipe tiuj kies kolesterolo jam troabundas en ilia sango!

## Mallonge pri ...

***DUBLADO DE FILMOJ***
Ĉu vi havas mirindan voĉon, aŭ via revo estas doni vian voĉon al grandaj film-aktoroj? Eble tiu ĉi projekto taŭgas al vi! Se vi interesiĝas pri dublado de filmoj kaj laŭleĝa tradukado, vi povas aliĝi ĉe Google-dissendogrupo: http://groups.google.com/group/filmoj-sen-limoj. Por bone kompreni pri kio temas, vi povas legi la priskribon kaj la arkivon de la grupo.
Informis *Francesco Costanzo*

*Fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu*

## *Fromaĝo Liptauer (Liptovsky Syr)*

Temas pri fromaĝo kiu originis el Liptau (Slovakio): produktita per ŝafa lakto, ĝi estis el mola pasto, sen krusto, kun forta gusto. Fine de la aŭstra-hungara imperio ĝi entute malaperis. Sed la memoro pri ĝia bongusteco postrestis en Triesto, tiom ke oni klopodis ĝin "kloni", farante ĝin kiel eble plej simila al tiu ne plu ekzistanta. La recepto estas tia kian vi pli sube legos: ekzistas kelkaj variaĵoj, sed tiu ĉi - laŭ triestaj kuirlibroj - plej elvokas la guston de la originala. En Triesto oni povas ĝin aĉeti en manĝaĵ- kaj fromaĝ-vendejoj, restoracioj aŭ bufedejoj.

La disvastiĝo de tiu ĉi plado estas granda: oni ĝin povas trovi en tuta Eŭropo, en la Amerikoj, en Azio, en Aŭstralio...: ĉie, do!

Notindas krome, ke en Hungario oni produktas freŝan fromaĝon kies nomo estas "liptai", dum en Serbio ĝi ricevas la nomon "lipski", kiu tamen estas ia loka maturigita fromaĝo, je duonkuirita, malmola pasto, produktita per bovina lakto.

***INGREDIENCOJ***

| | |
|---|---|
| 100 g | da moligita butero |
| 300 g | da selaktaĵo |
| 50 g | da kremfromaĝo (*maskarpono*) |
| 1 kaj ½ | kuleretoj da fajne haketita cepo |
| 1 | plenkulereto da mostardo |
| 2 | kuleretoj da anĉova pasto |
| | salo |
| 1-2 | kuleroj da papriko |

***PREPARADO***

Bone intermiksi ĉiujn ingrediencojn, ĝis fariĝas homogena la tuta kunmiksaĵo. La preparitaĵo devas esti ŝvelmola, ŝaŭmeca. Oni manĝas ĝin ŝmiritan sur tranĉaĵoj el sekala aŭ blanka panoj.

## *Ni kalkulu nin mem!*

Ekestis iniciato provi nombradi la esperanto-parolantojn en la mondo tra iaspeca publika subskribado. Ekde la 22ª de novembro 2010 jam sin anoncis pli ol 900 personoj, el Ĉinujo kaj Israelo, el Kanado kaj Svedujo, el Francujo kaj Brazilo…

Temas pri virtuala enviciĝo, en kiu – eĉ anonime, se tion oni preferas – oni povos briligi propran verdan stelon en la esperantista ĉielo … kaj sekve diri "ankaŭ mi estas". Malantaŭ ĉi tiu iniciato estas nenia ideologio (mi estas "sendependa" esperantisto), nur la deziro, post tiom da hipotezoj, pri kiom da esperanto-parolantoj estas en la mondo, nombri kiom da ni estas, senkonsidere ĉu oni aniĝas aŭ ne en iu ajn asocio. Estas fakte multaj kiuj, kiel mi, loĝas en urbo aŭ vilaĝo kie ne ekzistas iu Esperanto-klubo aŭ -grupo, sed kiuj tamen ne meritas esti esceptitaj el la enkalkulado. Sufiĉas dediĉi al ĉi projekto nur unu minuton de via tempo…

Jen la koncerna adreso:

http://www.thepetitionsite.com/1/esperanto-parolantoj-en-la-mondo/

Informis: Roberto Pigro Limassol destinazionecipro@gmail.com

*Fonto: Ret-Info http://www.eventoj.hu*

## Itala Esperanto Federacio alvokas...

FEI kaj la Komunumo *Mazara del Vallo* (Sicilio) interkonsentis pri malfermo de Centro por Interkulturo kaj Esperanto en la ĉeplaĝa sicilia urbo. Por ĝin aktivigi estas serĉataj:

A) Instruistoj (por instrui kaj al junuloj kaj ĉefe al plenkreskuloj);

B) Administra respondeculo. La dungado estos surbaze de Eŭropa projekto, kun daŭro de minimume 13 ĝis maksimume 45 semajnoj.

La salajro estos 4.263 eŭroj por la unua 13-semajna periodo kaj 192 eŭroj por ĉiu plia semajno. Ni preferus longdaŭrajn proponojn, por pli bone enradikigi la Centron en tiu regiono.

La interesitoj kontaktu kosmo@esperanto.it, por peti pli da informoj kaj la kandidatiĝ-instrukciojn. Kompletaj kandidatiĝproponoj devas esti pretaj antaŭ la fino de februaro. Kaze de akcepto de Eŭropaj instancoj, laborkomenco okazos ekde aŭgusto 2011. Depende de la estontaj cirkonstancoj, ni esperas, ke estos eĉ ebleco por pli longa kunlaboro.

### Ĉu tro malfacila?




Neniu sendis al mi la solvon de la kvizo de Viglo. Oni devis diveni, kio estas: **Ju pli ni perdas ĝin, des pli ni havas ĝin**. Perdita ŝanco! Grandanime, mi malkaŝas al vi, pri kio temis: la "**dorm(em)o**".

| Januara Programo | |
|---|---|
| **7** vendredo | **20h00** - Estrarkunsido malfermita al ĉiuj kaj laborado pri ekspozicio: kalkulado de voĉdonoj, ordigo ktp |
| **11** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **14** vendredo | **20h00** - Laborado pri ekspozicio |
| **18** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **21** vendredo | **20h00** - Laborado pri ekspozicio |
| **25** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **28** vendredo | **20h00** - Denove pri Mongolio: fotoj, filmoj k.a. |
| **Februara Programo** | |
| **1** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **4** vendredo | **20h00** - Emba...rasismoj! Legaĵoj el la libro de *Komla-Ebri* (vd. pĝ. 2ª) |
| **8** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **11** vendredo | **20h00** - Esperanto en interreto |
| **15** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **18** vendredo | **20h00** - Krucvortenigmoj |
| **20 dimanĉo** | **10h00 - Ĝenerala TEA-Asembleo** |
| **22** mardo | 17h00 - Posttagmezaj kursoj |
| **25** vendredo | **20h00** - El Esperanto-ĵurnaloj |

Bulteno de Trieста Esperanto-Asocio
**Redaktanto**: Elda Doerfler - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo**: Via del Coroneo 15 - Trieste - mardo 17-19; vendredo 19-21
**Tel**: (+39) 366 1720440 - 040 350093; 339 2226936
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscalinet.it
**Grupa ttt-ejo**://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina
**Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste - Italio
**Poŝtĉekkonto** Nº 10834349

# Ordinara Jara Asembleo de Tea

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos **dimanĉon la 20$^{an}$ de februaro 2011 je la 10h00 en unua kunvoko kaj respektive je la 10h30 en dua kunvoko**. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

## TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la Asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 2010:
    a) Morala raporto de la prezidanto *(Edvige Ackermann)*
    b) Agadraporto de la sekretario *(Elda Doerfler)*
    c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(Giuseppe Valle)*
    ĉ) Raporto pri la libro-fako *(Giuseppe Valle)*
    d) Deklaracio de la revizoroj *(Amalia Zerpini - Elio Nocent)*
    e) Raporto de la triesta katedro *(Elda Doerfler)*
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

## DELEGILO

La asociano _____

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta dimanĉon la 20$^{an}$ de februaro 2011.

Subskribo_____

Dato _____

**Notu bone!**
Okaze de la Asembleo eblos pagi al la kasisto la renovigojn de TEA-kotizo, FEI- kaj UEA-membrecoj, abonojn al diversaj ĵurnaloj kaj revuoj, aliĝon al UK ktp ktp. La sekretario peras abon-pagojn de LA GAZETO kaj membro-kotizojn de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista—Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj).